Laŭzana Esperanto-Societo
Oktobro 2019 - n-ro 8

# Laŭzana informilo

*Kunsidoj normale okazas ĉiumonate ĉe Espace Dickens. rue Dickens 6, Laŭzano*

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 4-an de novembro *Rosario prelegos...*
- Sa, la 14-an de decembro *Zamenhofa Festo*
- Lu, la 6-an de januaro *Decidota*
- Lu, la 3-an de februaro *Asembleo*

**Lunde, la 7-an de oktobro, je la 20-a**

**Venu kun viaj demandoj pri nia lingvo. Plie ni provos traduki esprimaĵojn.**

## LA SEKRETA VILAĜETO

Sabate, la 7-an de septembro, ni iris filmi en Montreux.

Borde de la lago Luko (Guillaume Fontaine) kaj Karlo (Romeo Bornand) konatiĝis kaj amikiĝis. Ili aŭskultis plezure la jodlan koruson, kiu koncertis tie.

Poste la kameraisto enbildigis la scenaran parton, kiam Karlo adiaŭis kaj foriris al la montaro pere de la trajno "GoldenPass".

Cédric Bornand, nia ŝoforo, kondukis nin al Blonay, kie la historia trajno permesis veturi al Chamby ... al la muzeo.

En Les Pléiades, Rosario Scopelliti - nia filmhelpanto - enigis la rolon de Ernesto, la bovgardito faranta lignajn florojn. Li ankaŭ ŝajnigis muziki alpkornon kun mi. (Poste la filma muntadisto enmetos la sonon al la silentaj bildoj).

Dimanĉe, la 8-an de septembro, nia piloto de la eta helikoptero realigis miridan bildon en Rivaz.

La pluvego invitiĝis, kiam la aktorgrupo grimpis al la ĉaledo. Dank'al la helpego de ĉiuj, ni povis ĉeesti por filmi  la parton, kiam Karlo alvenas en la domon de Paŭlo (David Buhlann) kaj Melodia (Noëlle Weyeneth).

Francisko

**Laŭzana Esperanto-Societo**

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

**Komitato 2019**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Lastsabata bazaro en *La Palud***
okazos la 12-an de oktobro je 9h.

**Babilada Rondo ambaŭgrupe**:

**Vendrede, la 18-an de oktobro** je la 19-a, Maryse Tissot invitos nin siahejmen en 1800 Vevey, route de Saint-Légier 20a
079 408 71 76

Notu, ke la kunsido ĉe Dickens je la 20-a de septembro estas nuligita pro filmado.

**La babiladaj rondoj ...**

***Okcidente, Oriente kaj Ambaŭgrupe***

Ni atendas viajn proponojn invitajn - inter oktobro kaj januaro - pri datoj, kiam vi povos gastigi nin. Kiu konsentas organizi ion? (076 369 29 17)

Dankon al vi.

**Temoj por monatkunsidoj**

Ni bezonas viajn ideojn por prepari la programon de niaj lundaj kunsidoj en Espace Dickens. Kiu deziras prelegi? Kiu volas organizi la renkontojn? Nia komitato sentas sin tre izolita kaj havas la impreson "remi" sola. Plie ĉu la kunsidoj ankoraŭ utilas, se ni nur ĉeestos ses aŭ sep ĉiufoje?

| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
|---|---|---|---|---|
| 6 | | | | |
| 7 | | ■ | 8 | |
| 9 | | 10 | | |
| 11 | | | | |

**HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)**

**1.** ___ nia, kiu estas en la ĉielo; **6.** Dializa aparato uzas artefaritan ___; **7.** Simbolo por erbio je kemio; **8.** Simbolo por neodimo je kemio; **9.** Detranĉo, tajlo; **11.** Sovet___ aŭ USSR (pluralo).

**VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)**

**1.** Atentu, ___, ek!; **2.** Gaso kiu ĉirkaŭas Teron (akuzativo); **3.** Konsonantoj de Ateno; **4.** Pli-malpli regula cirklo; **5.** La bruantaj ___ de la maro; **10.** ___, vi, ili.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| P | A | T | R | O |
| R | E | N | O | N |
| E | R | ■ | N | D |
| T | O | N | D | O |
| U | N | I | O | J |

# Karlo de Edmond Privat — oka ĉapitro: *La liceo*

Kiam Karlo estis dekdujara, liaj gepatroj opiniis, ke li sufiĉe longe restis en infana lernejo. Estis tempo meti lin en liceon. (*Liceo* estis, en la tempo de nia rakonto, la nomo de la oficialaj lernejoj, kie la knaboj lernadas, ĝis ili fariĝas studentoj). Estis unu liceo en la urbo. Bedaŭrinde ĝi estis malproksime kaj Karlo devos marŝadi dudek minutojn por tien iri de sia hejmo. Lia patrino proponis, ke oni aĉetu por Karlo biletaron por la tramvojo, sed S-ro Davis tute ne permesis tion. Li opiniis, ke marŝado estas tre bona kaj saniga ekzercado.

Por esti akceptata en la liceon, estis necese, ke Karlo sukcesu je ekzameno antaŭe. La ekzameno estis nek longa, nek malfacila. Tamen S-ro Davis volis certiĝi, ke lia filo sukcesos; por tio li venigis hejmen junan instruiston, kiu en kelkaj semajnoj pli progresigis Karlon en la kono de aritmetiko kaj ortografio, ol Sinjorinoj Linar en kelkaj jaroj.

Unu semajnon antaŭ la ekzameno S-ro Davis kondukis sian filon al la liceestro por lin enskribigi. La estro estis tre malalta viro kun grizaj haroj, griza barbeto kaj rondaj, brunaj okuloj post oraj okulvitroj.

- Sinjoro direktoro, diris S-ro Davis, kiam la servisto lin enirigis kun lia filo en la direktejon, kiel vi sanas? Mi ĝojas vin revidi, kaj alkondukas al vi mian knabeton Karlon, kiu estos espereble bona lernanto en la liceo.

La direktoro rigardis Karlon tra siaj grandaj okulvitroj kaj malfermis larĝan libregon.

- Davis, Karlo . . . kiu estas via alia antaŭnomo, junuleto?

- Teodoro, Sinjoro direktoro, respondis Sinjoro Davis vidante, ke lia filo distrate ne aŭdis la demandon. Efektive Karlo estis distrata: li ĵus vidis muŝon, kiu dronis en la kupran inkujon kaj li atente observis ĝiajn penojn por forflugi.

- Via aĝo? demandis la direktoro.

S-ro Davis pinĉis la brakon de Karlo: "Kiom jara vi estas, Karlo?"

Karlo ektremis kaj serioziĝante lia vizaĝo tute ruĝiĝis: "Dekdujara, sinjoro," li diris timeme.

- "Vi venu lundon," diris la direktoro, "je la 8-a matene kun inko, plumo, krajono, kaj blanka papero por la ekzameno. Via filo, Sinjoro Davis, ŝajnas bona kaj inteligenta knabeto. Bonan tagon . . . atentu la ŝtupon post la dua pordo maldekstre."

Elirante el la skriboĉambro de l' direktoro, S-ro Davis montris al sia filo la internan korton de la liceo. Meze de la du novaj konstruaĵoj staris la malnova parto de la lernejo, kun duobla ŝtuparo super kolonoj kaj arkaĵoj.

- Tien venadis multaj generacioj antaŭ mi kaj vi, diris al Karlo lia patreto. Via avo kaj niaj praavoj tie lernadis, kiam ili estis knaboj.

(Fare de Francisko)

# Intervjuo de Lucienne Dovat, Honora Membro de LES



*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis la 15an de aŭgusto 1919. Mi studis por iĝi kudro-instruistino. Mia edzo nomiĝis Jacques. Kune ni instalis nian hejmon en Corcelles. Ni havas 2 infanojn, François kaj Jaqueline.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**En Corcelles/Payerne mia kuzino Violette donacis al mi libron pri esperanto. Mi neniam aŭdis pri tiu lingvo antaŭe kaj tuj interesiĝis.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Kiam ni translokiĝis en Renens, mi sekvis - kiel sola lernanto - kursojn de la laŭzana societo en la popoldomo. Rapide mi parolis pli bone ol la prezidanto.**

*- Kion pensas via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Mi neniam aŭdis kritikojn ĉirkaŭ mi. Mia edzo ne vere interesiĝis pri esperanto.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Mia filino Jaqueline partoprenis ferian kampadumon kun Claude Gacond kaj bone studis esperanton. Poste ŝi prezidis dum kelkaj jaroj la laŭzanan societon.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**En la komenco, la prezidanto multe ŝatis organizi vojaĝojn. Ni aliĝis, Jacques kaj mi, al tiu en Ĉeĥoslovakio. Poste mi partoprenis la UK-on en Lucerno en 1979.**

***PS: Pardonu, mi ne plu rememoras ĉiujn datojn.***